

# STARTO

**N-ro 3/2007 (224)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



**La kongresejo de la 92-a UK en Jokohamo**

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz

**IĈO de ĈEA:** 00 44 30 34

**rete Starto:** malovec@volny.cz,

**rete ĈEA:**

cea.polnický@quick.cz (sekretario)  
melicharkova@quick.cz (prezidanto)  
www.esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

**Libroservo:** p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

195 230 825 / 0300

Poštovní spořitelna Poděbrady

## Komitato de ĈEA:

**Prezidanto:** Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz (reprezentace ĈES, koordinace, vnitřní vztahy, metodika)

**Vicprezidanto (komitatano A de UEA):** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříčovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinárodní vztahy, odborná aplikace esperanta, vydavatelská činnost, EU, retkomunikoj)

**Vicprezidanto:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (muzeum)

**Sekretario:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz

**Kasisto:** Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 385 367, hirs@gm.vyskov.cz (členská základna, účetnictví)

**Komitatano:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradská@volny.cz (kluby, konference, zápisy, čestní členové)

**Komitatano:** Miroslav Vaněk, 507 44 Libošovice 104, vanekmi@centrum.cz, (sekce, komise)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Prezidanto: Věra Štěpánová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., stepanova.v@kr-ustecky.cz; Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef-hron@volny.cz, tel. 466 401 942;

Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@pcp.lf3.cuni.cz

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, malovec@volny.cz.

**Kontrollegis:** Z. Hršel, S. Hauge kaj la komitato

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

## 92-a UK Jokohamo

4-11 aŭgusto 2007

Sub kongresa temo **Okcidento en Oriento: Akcepto kaj rezisto** kolektiĝis en la japana Jokohamo 1900 esperantistoj el la tuta mondo. La kongreson inaŭguris prezidanto Renato Corsetti, salutis jam tradicie Louis C. Zaleski-Zamenhof. Pri la kongresa temo prelegis japana verkisto Tsuda Yukio, kiu konstatis, ke tutmondiĝo estas fakte usoniĝo, kulture kaj lingve. Sian mesaĝon al la mondo sendis Hiroŝimo, kiun trafis atombombo la 6-an de aŭgusto 1945.



El la riĉaj labora, kultura, ekskursaj kaj prelega programoj ni elektas:

**Nova estraro.** Dum la kongreso estis elektita nova estraro de UEA: Probal Daŝgupto (prezidanto), Raineri Clerici kaj Claude Nourmont (vicprezidantoj), Barbara Pietrzak (ĝenerala sekretario), Loes Demendaal, Hori Jasuo, José Antonio Vergara.

**Novaj honoraj membroj:** la hungaro **Endre Dudich** (1934), honora prezidanto de HEA, laboris kiel geologo en multaj landoj, tradukis al Esperanto ĉ. 1700 paĝojn, liaj propraj verkoj estas *Ĉu vi konas la teron?* kaj *La lumo nutranta*. La japana akademiano **Konisi Gaku** (1934) gvidis kolektivon por *Esperanto-Japana Vortaro*, esperantigis el la japana librojn *Vilaĝoj en bataalkampo*, *La Neĝa Lando*, *Notoj pri la delto*, *Nokto de la Galaksia Fervojo*, *La Flambirdo*, lia originalaĵo estas *Vage tra la dimensioj*.

**Ondas Jokohamo** estas la nomo de kongresa kuriero. Aperis 6 numeroj plus unu ekstra, ĉiuj estas elŝuteblaj el la interreto.

**Novaj libroj** aperintaj dum la kongreso: *Historio por Malfermi Estontecon* estas moderna historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio. *Japana Kalejdoskopo* prezentas japanan kulturon de la antikvo ĝis nuntempo. *Rememoroj pri tempo de silko kaj pajlo* prezentas rememorojn de kvindeko da maljunaj homoj de la 20-a jarcento, vivintaj en orienta japana urbeto.

**Kulturo:** ne mankis tradiciaj nacia kaj internacia vesperoj, koncertoj, bankedo, japana eksprese, tago de libro, kunsidoj de E-organizoj, prelegoj pri Japanio kaj ankaŭ ekskursoj (Tokio, Fuĝi-monto k.a.) ktp.

## Probal Daŝgupto la nova prezidanto de UEA



Estimataj geamikoj:

Mi estas estimanto de la amikecoj. Mi salutas vin en la nova rolo de via prezidanto, kiu havas la privilegian devon konstante aŭskulti vin. Esperanto estas specife amika kaj aŭskultema lingvo. Ni donis unikan formon al nia helpemo ekde 1914. Dum la Unua Mondmilito ni peris mesaĝojn, manĝaĵojn, medikamentojn inter la militantaj landoj. Ĉu nur dum milito aperas tiaj urĝoj? Ne! Ĉiam ekfajras krizaj bezonoj, ĉu pro subita tertremo ie, ĉu pro konstanta nutraĵomanko aliloke. Niaj helpemaj komunik-rimedo devas ĉiam esti pretaj aŭdi la petojn de akutaj bezonantoj kaj trovi kapablulojn, kiuj tuje kaj taŭge fajrobrigados la fajrojn - precize kiel dum militoj.

Ĉu tia ĝeneralega, skolta helpemado - okupiĝanta pri viktimoj de

inundoj, de malsatego, de tertremoj - estas vere prioritata en movado por neŭtrala mondlingvo? Ni jam respondis tiun demandon en 1914. Jes ja.

Ni estas helpema lingvanaro; ni kredas, ke la lingvoj devas per neŭtrala pontado plibonigi sian komunikreton. Kial? Ĝuste ĉar la plej drastaj suferantoj bezonas esti atingataj kaj servataj fulmrapide. Eĉ sur pli banala nivelo, ni ĉiuj ja scias, ke la delegita reto kaj aliaj UEA-strukturoj estas absolutaj antaŭkondiĉoj por nia kolektiva ekzisto, pli gravaj ol la gramatiko.

La nuna estraro laboras por plifirmigi niajn instituciojn, ĝuste ĉar ni vidas en ili la esencon kaj estontecon de la zamenhofa lingvo. Venas 2008, kiun UN deklaris la Internacia Jaro de la Lingvoj; kaj ni centjariĝos! Vi, kiuj kongresas, kaj precipe tiuj inter vi, kiuj staras ĉe la sojlo de UEA kaj ne en nia anaro, bonvolu ja aliĝi al la Asocio kaj kunagi kun ni! Vi trovos, ke ni helpas atingi ankaŭ viajn celojn.



*La nova UEA-estraro sin prezentas*

## Rezolucio de la 92a Universala Kongreso de Esperanto

La 92a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Jokohamo (Japanio) kun 1900 partoprenantoj el 57 landoj kun la temo "Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto",

Konstatinte, ke ideoj kaj influoj moviĝas ambaŭdirekte inter "Okcidento" kaj "Oriento", sed ke pro la aktualaj neegalecoj tiu reciprokeco iĝis nevidebla,

Konstatinte, ke tiu sama kaŭzo malhelpas ankaŭ la fluon de ideoj kaj influoj inter aziaj landoj,

Notinte, ke tro rigidaj konceptoj pri "Okcidento" kaj "Oriento" malhelpas interlokajn dialogojn, kaj

Notinte kun kontento, ke la 2008a jaro estas proklamita fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kiel Internacia Jaro de Lingvoj,

Rekomendas, ke la rilatoj inter civilizoj kaj kulturoj baziĝu ne sur konflikto sed sur interkompreniĝo, justeco kaj paco,

Konfirmas la potencialon de Esperanto por interponti homojn de diversaj lingvoj kaj kulturoj,

Atentigas samtempe pri la akuta neceso konsciiĝi pri interkulturaj problemoj en kaj ekster la Esperanto-komunumo, kaj rilati kun instancoj kaj asocioj kiuj jam okupiĝas pri tiaj problemoj,

Deklaras, ke la ekesto de regiona

kunlaboro ankaŭ en Azio kaj aliaj mondopartoj estas esenca antaŭkondiĉo por la plua disvolviĝo de Esperantaj agadoj tie,

**Esprimas la senkondiĉan subtenon de la Esperanto-komunumo al vera plurlingvismo kiel rimedo por akceli unuecon en diverseco, kaj kuraĝigas esperantistojn energie labori por la plenumo de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Jaro de Lingvoj.**

## Internacia Kongresa Universitato

Realigis jenaj prelegoj:

\* Amri Wandel: *Astronomio: gastosteloj en la Galaksia fervojo*

\* José Antonio Vergara: *Kial japanoj vivas 81,9 jarojn kaj siera-leonanoj nur 34? Malegalecoj je sano kaj ties sociaj determinantoj*

\* Sibayama Zyuniti: *Geografia Informo-sistemo (GIS) en nia vivo*

\* Lee Chong Yeong: *Kapitalismo kaj Konfucea Kulturo*

\* Gotoo Hitosi: *La Vortaro por Lernantoj*

\* Eugen Macko: *Orient-okcident-dialogo laŭ la pensmaniero de Heidegger*

\* Yamasaki Seiko: *Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto*

\* Zhu En: *Esperanto kaj Bakin*

\* Kimura Goro: *Ĉu malplimultaj lingvoj estas ekonomiaj malvenkintoj?*

## Nitobe-simpozio

Ankoraŭ antaŭ la kongreso (2-3 aŭgusto 2007) realiĝis en Jokohamo la 5-a lingvopolitika Nitobe-simpozio sub devizo *Eŭropaj lingvoj kaj aziaj nacioj: pasinteco, politiko, potencialo*. Prelegoj faritaj dum la simpozio:

\* Jean-Claude Hollerich: *Eŭropa grammatiko en Azio*

\* Humphrey Tonkin: *La Nitobe-procedo en azia kunteksto*

\* Masahiro Sato: *La interponta ideo de Nitobe kaj helplingvo*

\* Kimura Goro: *Internaciaj lingvoj, fremdaj lingvoj kaj minoritataj lingvoj: interrilateco de lingvaj problemoj*

\* Richard B. Baldauf: *Sukceso kaj malsukceso en lingva planado por eŭropaj lingvoj en aziaj nacioj*

\* Tove Skutnabb-Kangas: *Lingvaj homaj rajtoj en edukado - tro malmulte, tro malfrue?*

\* Hugo Cardoso: *Kion signifas eŭropa? Defio de intenskontaktaj variaĵoj por lingva klasifiko*

\* Sergej Anikejev: *Rusa kulturo kaj japana socio*

\* Zegimaa Choidon: *Eŭropaj lingvoj kaj Mongolio*

\* Atsushi Ichinose: *Reviviĝo de la portugala en Azio*

\* Izumi Kunihisa: *La franca lingvo en la japana socio*

\* Usui Hiroyuki: *Esperanto por "venki Eŭropon": soci-evoluisma interpreto en Japanio*

\* Marek Koscielni: *La kultivado de fremdlingva edukado en la japana kultura kunteksto*

\* Robert Phillipson: *La nova lingvo-imperia ordo: lecionoj eŭropaj kun tutmonda signifo*

\* Kawahara Toshiaki: *Anglalingva edukado kaj lingvopolitiko en Eŭropo*

\* Feng Zhiwei: *La rolo de la angla lingvo en Ĉinio*

\* Joseph Errington: *Koloniismo, naciismo kaj la disvastiĝo de lingvoj de pli vasta komunikado*

\* E. Annamalai: *La angla en la lingvoekologio de Barato*

\* Probal Dasgupta: *La vivanteco de gepatraj lingvoj: uzi la tradukadon kiel kultivilon*

\* Totok Suhardijanto: *La indonezia inter aliaj lingvoj en Indonezio*

\* Mark Fettes: *Esperanto, ĉu azia lingvo?*



*Unu el la kongresaj prelegejoj*

## Belartaj konkursoj 2007



### POEZIO

**Unua premio:** Anja Karkiainen (Finnlando) pro "En ambaŭ";

**Dua premio:** Michael Cayley (Britio) pro "Memoroj";

**Tria premio:** ne aljuĝita.

*Partoprenis 30 verkoj de 16 aŭtoroj el 13 landoj.*

### PROZO

**Unua premio:** Tim Westover (Usono) pro "Ruĝvela ŝipo";

**Dua premio:** Lena Karpunina (Rusio) pro "La botoj";

**Tria premio:** Sten Johansson (Svedio) pro "Frotvundo".

*Partoprenis 24 verkoj de 13 aŭtoroj el 11 landoj.*

### ESEO

**Unua premio:** Geoffrey Sutton (Britio) pro "Pri la periodoj de la Esperanto-literaturo";

**Dua premio:** Paulo S. Viana (Brazilo) pro "Psiko-memhela literaturo: utila? senutila? malutila?";

**Tria premio:** Tony del Barrio (Hispanio) pro "La normala lingvo".

*Partoprenis 8 verkoj de 6 aŭtoroj el 5 landoj.*

### TEATRO

**Unua premio:** ne aljuĝita;

**Dua premio:** Brian E. Drake (Usono) pro "Koroj en mallumo";

**Tria premio:** ne aljuĝita;

**Honora mencio:** Stefan MacGill (Hungario) pro "La aŭto-mato".

*Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.*



### INFANLIBRO DE LA JARO

Eldonejo "Éditions Pour Penser à l'Endroit" pro la libro "Ĉio fareblas" de Aline de Pétigny, tradukita de Martine kaj Christian Rivière.

*Partoprenis 5 verkoj el 5 landoj.*



### KANTO

**Unua, dua, tria premioj:** ne aljuĝitaj;

**Honora mencio:** Dina Lukjanec (Kazaĥio) pro "La urbo ora".

*Partoprenis 8 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.*

## Renkontiĝo kun Kurisu Kei en Jokohamo

Pli junaj membroj de ĈEA eble eĉ ne konscias pri la fakto, ke Ĉeĥa Esperanto-Asocio havas en la vicoj de siaj honoraj membroj ankaŭ eksterlandanon, eĉ el la fora Japanio. Tial mi dum mia renkontiĝo kun li, japana bohemisto kaj perfekta esperantisto, tuj encerbigis la ideon, ke mi devas iom rememorigi lin al niaj membroj, kion mi provas nun plenumi.



Kurisu Kei jam estas pli ol 97-jara - sed necesas admiri lian energion, kiu estas kaŝita en lia maljuna korpo! Mi ne volas ĉi tie listigi ĉion, kion li travivis, kion li verkis aŭ tradukis. Ne sufiĉus la kajero de Starto por tio kaj plejparton (almenaŭ kio koncernas Ĉeĥion kaj precipe la ĉeĥajn lingvon kaj literaturon) oni povas legi en lia broŝuro *Kion donis al mi la ĉeĥa literaturo* (Kurisu Kei: Co mi dala

česká literatura, KAVA-PECH, 1996). Sed mi devas menciigi minimume, ke li tradukis el la ĉeĥa japanen ekzemple 8 verkojn de Karel Čapek, sed ankaŭ *Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk* de Jaroslav Hašek, *Avinjo* de Božena Němcová kaj multajn aliajn. Dum sia traduko de *Raporto skribita sub pendumilo* de Julius Fučík, komparante diversajn ĉeĥajn eldonojn, li eĉ malkovris, ke post la jaro 1948 la cenzuro eligis partetojn de la teksto eĉ de la verko de tiu fama komunisma heroo.

Kiu sekvas periodaĵojn de SAT, scias, ke K. Kurisu eĉ nun ne ripozas, sed plu diligente verkas. Kaj mi povas malkaŝi, ke li ankoraŭ havas plenan kapon de planoj, kiujn li volas plenumi kiel verkisto kaj tradukisto.

Ni renkontiĝis kelkfoje, kaj en Japanio, kaj en Ĉeĥio dum lia lasta vizito de nia lando, okaze de la Universala kongreso en Prago en la jaro 1996. Tiam ni komune vizitis ekzemple la monton Říp kaj la koncentrejon Malgranda Fortreso en Terezín pro lia senlima intereso pri la ĉeĥaj historio kaj realaĵoj. Sed ni ankaŭ kunvenis kun funkciuloj de Ĉeĥa-Japana Asocio (cetere, ankaŭ ĝia honora membro Kurisu Kei estas) kaj eĉ vizitis la laborĉambron de la ŝtatprezidento Václav Havel. Dum tiuj vojaĝoj, kaj precipe dum niaj vesperaj interparoloj antaŭ ol enlitiĝi, pli proksime ekkonante tiun admirindan personecon kaj ekamikiĝante kun li, mi ekhavis la ideon eldoni liajn rememorojn pri lia rilato al Ĉeĥio, el kio tre rapide ekestis la jam nomita broŝureto. Sed ni renkontiĝis ankaŭ poste dum miaj vizitoj de Japanio (lastan fojon en 2001) kaj ĉiam temis pri tre agrablaj kaj interesaj renkontiĝoj.



Tial mi estis vere kortuŝita, kiam mi vidis lin dum la Movada Foiro, ĉar konante la aĝon mi vere ne supozis lian personan ĉeeston. Kaj kun kia intereso li iris de unu giĉeto al la alia! Mi priservis tie kun geedzoj Bloudek la komunan giĉeton de KAVA-PECH kaj Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj ekvidante mian malnovan amikon mi tuj kuris renkonti lin kaj ni havis tre amikan kaj interesan interparolon, unu el tiuj, kiujn oni neniam povas forgesi! Kia intereso pri la novaj libroj, pri la eldona agado, longa trafoliumado de la nova eldono de la Biblio! Vera miraklo: korpe lama, malbone vidanta, malforte aŭdanta, sed anime junulo entuziasma! Precize tia estas la honora membro de ĈEA Kurisu Kei.

Mi finas tiun ĉi artikoleon per la esprimo de miaj estimo, amo, sed precipe admiro al mia malnova kaj maljuna amiko Kurisu Kei kaj publike deziras al li, kaj ankaŭ al ni ĉiuj, ke li ankoraŭ longe vivu kaj havu forton plenumi multon de siaj grandaj verkistaj kaj tradukistaj planoj!

*Petro Chrdle*

## **Lige al UK en Jokohamo**

Kiel organizanto de ĉi-jara flugkaravano al Japanio mi travivis kelkajn surprizojn kaj mi ĝojas, ke ĉiuj estis pozitivaj. Miaj impresoj, kaj kiel de organizanto kaj kiel de partoprenanto, estis tiel fortaj, ke mi volas disdividi ilin ankaŭ kun la legantoj de Starto.

Jam la komenco estis surpriza, nome la nombro de interesatoj. Same kiel antaŭ organizo de la flugkaravano al la pekina UK mi turnis min al la vojaĝoficejo China Tours, kiu estas laŭ mia opinio kaj

antaŭaj spertoj la plej bona kaj plej fidinda vojaĝagentejo por la ekskursoj al Azio, jam pro tio, ke la ĉiĉeronoj estas veraj fakuloj pri la koncernaj landoj. En Ĉinio ĉiĉeronis por ni sinologo, en Japanio do japanologo aganta jam 5 jarojn en la universitato en Japanio. Do la programo estis tre bone preparita precize laŭ miaj deziroj. Tamen mi iom timis, ĉu eblos realigi ĝin, ĉar la minimuma nombro estis fiksita je 10 kaj antaŭanoncis sin nur 6 interesatoj. Mi tamen diskonigis la informon kaj okazis miraklo: rapide aliĝis ne nur 20 personoj, por kiuj ni havis rezervitajn lokojn, sed ni devis kelkfoje almendi pliajn ĉambrojn kaj finfine, kiam ni estis 32, ni devis vere malakceptadi pliajn malfruajn aliĝintojn, ĉar pliaj deziris kunvojaĝi.

Do, unuflanke mi povis fieri, ĉar pluraj aliĝintoj estis "miaj" antaŭaj klientoj, kio estas klara esprimo de kontento. Tamen, mi sentis pli da zorgoj ol da ĝojo, ĉar mi devas konfesi, ke mi antaŭtimis, ĉu ni ne akceptis tro da partoprenantoj, precipe sciante, ke pro deziro, ke la prezo estu kiel eble plej malalta, ni elektis ĉiam publikajn trafikilojn, kio signifis kelkfoje ankaŭ uzon de taksioj. Kaj konante Japanion, kien mi jam gvidis kelkajn grupojn de sportistoj, precipe la komplikajn stacidomojn, mi veturis tien kun ioma timeto, ĉu vere nia ĉiĉerono tiel bone konas la kondiĉojn kaj ĉu li ne troigis la indikon, ke eblas veturigi 32 personojn.

Ni estis kiel kutime dekomence internacia grupo: el Prago ni flugis 17, 10 el Ĉeĥio, 1 el Slovakio, 5 el Germanio kaj 1 el Francio, sed en Jokohamo ni renkontiĝis kun samkaravananoj el Hungario, Italio kaj pliaj el Germanio kaj

Francio kaj krome kun nia ĉiĉerono. Kaj jam post la unua transporto per trajno de la flughaveno Oosaka al stacidomo Kioto kaj de la stacidomo Kioto al nia hotelo per taksioj mi ne plu timis pri la transportado. Se tiel glate iris ĉio kun la valizoj, certe ankaŭ ne estos problemoj sen ili. Do ekde tiam mi pli libere spiris, des pli, ke mi tuj pritaksis kelkajn antaŭe al mi ne konatajn klientojn kaj ekkomprenis, ke regos vere amika etoso - kio ankaŭ okazis.

La unua semajno estis turisma, la dua kongresa (tamen kun turismaj enŝovoĵoj) kaj la tria parto estis, almenaŭ por 12 kuraĝuloj inter ni, sporta, nome supreniro al la pinto de la plej alta, la plej fama kaj la plej sankta monto de Japanio, la monto Fuji.

Antaŭ ol mi komencos pri niaj travivaĵoj ekster la UK, mi ankoraŭ revenu al la kongreso mem, nome al la programero "Libroj de la jaro", kiu tradicie prezentas la novaĵojn aperintajn ekde la pasinta kongreso. Inter preskaŭ dudeko da eldonejoj prezentiĝis ankaŭ la ĉeĥa eldonejo KAVA-PECH, kiu prezentis siajn novaĵojn, nome *La afrika medicino, mirige efika* de Yvette Parés en traduko de Jacques Roux, novan eldonon de la *Biblio*, editoritan de la ekumena komisiono de IKUE kaj KELI, *Ĵim, la migrulo, aventuroj de juna leopardo* de Siegfried Stampa en traduko de Rüdiger Sachs, prelegkolekton de la lasta KAEST *Lingvo kaj interreto kaj aliaj studoj* redaktitan de Zdeněk Pluhař kaj fine kiel juvelon la plej novan poemaron de Eli Urbanová *Prefere ne tro rigardi retro*, resumantan la ĝisnunajn poemarojn de nia mondfama Esperanto-poetino, el kiu Margita Turková

deklamis la poemon *Matenmanĝo*.

Sed al la turisma programo.

Ne eblas priskribi ĉion, kion ni vidis, eble iam iu partoprenanto priskribos aliajn partojn de nia esplorado de Japanio. Por multaj certe estis la plej rava la veturado sur la Ŝinkanzen-trakoj, la sistemo de stacioj, kiam oni surkaje ĉiam scias precize je centimetroj, kie malfermiĝos la pordo de lia rezervita vagono, la precizeco ... Tamen, unufoje ni travivis malfruiĝon: oni anoncis (kaj nia ĉiĉerono David tradukis por ni) kun granda pardonpeto kaj klarigo de la kialo, ke la trajno alvenos kun la malfruiĝo de 2 minutoj!

Sed mi volas iomete tuŝi almenaŭ tri el niaj vizitoj: de Oomoto, de Hiroŝimo kaj de la pinto de Fuji.

Tuj kiam mi komencis plani la flugkaravanon al Japanio lige al la UK, mi revis pri tio povi viziti la centrojn de Oomoto. Mi jam estis tie en la jaro 1995 kaj ĝi ege impresis min pro kelkaj aferoj: Pro ilia ne nur estimo, sed daŭra praktikado de japanaj tradicioj, pro la sukcesplenaj interreligiaj streboj de Oomoto, ke la malsamaj religioj ne batalu unu kontraŭ la alia, sed kunlaboru, kaj ne laste pro ilia pozitiva sinteno kaj subteno de Esperanto, kio estas bone esprimita per la slogano, kiun oni povas legi en la fama monumento en la administracia kaj eduka centro de Oomoto en Kameoka: Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo. Oni ne diras Esperanto, sed ĉar evidente nun Esperanto estas la plej taŭga inter la internaciaj lingvoj, oni elektis ĝin kaj eĉ ekzistas ene de Oomoto EPA, Esperanto-Populariga Asocio.

Mi skribis al EPA kaj mi ĝojegis ricevinte la permeson de la EPA-sekretario

Ago Takaŝi, ke ni rajtas viziti la centron en Kameoka kaj mi ĝojegis legante, ke nin tie gvidos mia multjara amiko kaj eksa UEA-kunestrarano Tacuo Huĝimoto. Sed mi estis eĉ pli postulema kaj petegis, ĉu eblus viziti ankaŭ la spiritan centron de Oomoto en Ajabe. Pro aŭfaleco de Oomotanoj ni ne nur povis viziti ambaŭ iliajn ĉefajn centrojn, sed ĉeestis eĉ du Diservojn, vizitis la vilaĝon ene de la centro en Ajabe, kie oni praktikas tradiciajn metiojn (inkluzive de nuna spirita gvidantino de Oomoto Deguĉi Kurenai, fondinto de la vilaĝo). Kelkaj eĉ povis provi sian manlertecon. Ni povis komune tre favore preze manĝi kun Oomotanoj klasikajn japanajn manĝojn, vizitis tombejojn, aŭdis pri la historio, gustumis ne nur teon, per kiu oni aŭfable regalis nin, sed ankaŭ sidadon surplankan ĉe malaltaj tabletoj en la klasĉambro kaj fine ni fotiĝis ĉe la famkonata jam menciita monumento. Mi supozas, ke temis pri unu el la plej impresaj vizitoj de nia karavano.



*Kameoka*

Certe ankaŭ estas menciinde, ke ni postlasis en Japanio daŭran spuron: en la bildo vi povas vidi Margita Turková skribantan sur la tegolon memoraĵon pri nia karavano. Per aĉeto de tiu tegmento ni ne nur subtenis la strebon novkonstrui la detruitan ĉefan konstruaĵon de la templo Todajĝi, sed ĝi restos tie por ĉiam kiel atestanto de nia internacia

Esperanto-flugkaravano.



Kion mi ankaŭ devas nepre menci, ĉar la impreso estis tre forta, estas la vizito de Hiroŝima kaj la supreniro al Fuĝi, sed pri tio en venonta numero de Starto.

Fine de la karavano franca paro esprimis grandan ĝojon, ke ili partoprenis nian karavanon kaj miasurprize, ili plej laŭdis tion, kion mi antaŭtimis, ĉu ne estis eraro dum la planado: ke ni uzadis la publikajn trafikilojn kaj tiel multe pli bone ekkonis la veran vivon de japanoj, ol se ni transportiĝus per specialaj aŭtobusoj el la hotelo al unuopaj vidindaĵoj. Kaj ankaŭ mi ricevis demandon, ĉu mi organizos karavanon lige al la Azia kongreso en februaro 2008 en Barato "Hinduĵo". Mi ne planis tion, sed estante instigita mi jam planas komunan vojaĝon al Barato kaj Nepalo kun la vizito de la Azia kongreso post miaj pozitivaj spertoj kun China Tours denove kune kun ĝi kaj kun ĝia ĉiĉerono - tiukaze hindologo.

*(daŭrigota venontfoje) Petro Chrdle*

## Co myslíte, že je třeba dělat?

Za 120 let vykonalo naše hnutí dost práce, ale abychom si při 130 výročí esperanta nemuseli vyčítat, že jsme za uplynulé desetiletí příliš nepokročili, měli bychom se nyní zamyslet, na co se zaměřit. Co by dnes plánovali takoví lidé, jako byli Miloš Lukáš, Rudolf Hromada, Stanislav Kamarýt, Tomáš Pumpr, Theodor Kilian, Jiří Kořínek, Josef Vondroušek nebo sám Zamenhof? Co by dělali v době Evropské unie, počítačů, internetu a svobody projevu?

Máte-li vlastní představu, koncepci nebo jenom nápad či nápadeček, podělte se o ně. Napište redaktorovi Starta (Miroslav Malovec, Bosoňská 15/10, 625 00 Brno, elektronicky [malovec@volny.cz](mailto:malovec@volny.cz)). Vaše myšlenky zveřejníme, rozsáhlé úvahy dáme na internet. Důležité je, abychom vůbec začali o budoucnosti hnutí přemýšlet a diskutovat. Abychom si stanovili cíle krátkodobé i dlouhodobé, pro řadové členy i pro lidi s organizačními, literárními či jazykovědnými sklony.

Čeho vlastně chceme dosáhnout? Čím by se měl náš svaz lišit v roce 2017 od roku 2007? Co se má stát s našimi knihovny, rukopisy a dalšími archiváliemi? Co s kluby?

## Kion farus nia Majstro, se li havus komputilon?



### Kaj interreton? Kaj se li loĝus en Eŭropa Unio?

Nia movado nun atingis sian 120-jariĝon, kaj ankaŭ epokon de demokratio, komputiloj, interreto, tut-eŭropiĝo kaj tutmondiĝo. Niaj kondiĉoj tre diferencas de tiuj, en kiuj vivis Zamenhof, sed ankaŭ Kalocsay kaj Lapenna spertis tute aliajn situaciojn por sia laboro.

Kion ili farus, se ili vivus nun, junaj kaj plenaj de energio? Kion ili volus atingi ĝis 2017, por ke la movado troviĝu en pli favora situacio ol en 2007? Kiuj konkretaj paŝoj estas necesaj, por ke la lingvo estu alloga por la juna generacio? Por ke oni povu ĝin ne nur lerni, sed ankaŭ utiligi?

*La redakcio*

**Vesmír zvoní hvězdami / Kosmosonoras per steloj**, Zdenka Bergrová, trad. Jaroslav Krolupper, *du-lingva spegula eldono, ilustris Věroslav Bergr, Ústí nad Orlicí, OFTIS 2007, 84 p.*

La broŝuro alportas sesdekon da poemoj el la verkaro de Zdenka Bergrová, kiujn elektis kaj esperantigis Jaroslav Krolupper, kies esperantlingva traduka kaj originala verkado vekas ĉiam pli grandan admiron kaj gajnas premiojn en internaciaj konkursoj. Pri la libro informis Miroslav Sígl en Pozitivní noviny (<http://www.pozitivni-noviny.cz/cz/clanek-2007080017>) kaj samtempe klarigis la celojn kaj historion de Esperanto. La eldonejo OFTIS ofertas la broŝuron kontraŭ 83 Kč ([www.oftis.cz](http://www.oftis.cz)).

**Ĉu ili diras al ni la veron? Neimagebla perforto.** SAT 2007, 220 p.

La libro rakontas spertojn de fuĝintoj el nordkoreaj koncentrejoj kaj malliberejoj, kie estas tenataj precipe politikaj malliberuloj. Malpurco, malsato, mortlaciga laborego, humiligo, torturado, morto. Multon rakontas jam la titoloj de unuopaj atestoj: *Kristana familio dumvive detenita pro preĝado, Subtera ĉambro por krizaj ekzekutoj, Gardistoj ricevas instrukciojn esti senkompataj kun la malliberuloj, Vi rajtas*

*mortfrapi, pafi malliberulojn ie ajn, kiam ajn kaj pri iu ajn kialo, Tipa aspekto de malliberuloj, La malliberuloj devigataj riverenci antaŭ la infanoj de la oficistoj pri sekureco, Dormkondiĉoj de malliberuloj, Vespera nomvokado, Ŝtelado el mortintaj malliberuloj, Ĉu vi aŭdis pri la homa motoro?, Malliberuloj portas fekaĵon, Mortintaj malliberuloj enterigitaj sub fruktarboj, Malliberuloj kaptas ratojn por transvivi, Komunuma necesejo por ĉiuj malliberuloj, Malliberuloj mortas post restado en punĉelo, Gardistoj urinas sur malliberulon pro amuzo, Forŝirado de la oreloj de malliberulo, torturo per akvo, serpento aŭ frostigo, Mi estis brutale batita pro helpo al amiko, Infanoj senkompatate batitaj pro malgrava delikto, Du infanoj-malliberuloj mortigitaj de gardhundoj, Sekreta ekzekuto, Beboj naskitaj kaj mortigitaj, Graveda malliberulino devigita aborti ktp. Sume 118 atestoj.*



## Ĉu vi konas eŭropajn klerigajn projektojn?

EU ne volas esti nur Eŭropo de ekonomio, sed ankaŭ **Eŭropo de scioj**. Tial estis lanĉita **projekto Socrates**, kiu konsistas el pluraj programoj. Programo **Comenius** okupiĝas pri ĝenerala klereco kaj estas destinita por kunlaborigi internacie gimnaziojn. Programo **Erasmus** helpas al universitataj studentoj studi eksterlande kaj al instruistoj eksterlande prelegi. Ĝi ankaŭ celas certigi, ke la diplomoj estos rekonataj en la tuta Eŭropo, kvankam ĉiu lando havas alian edukan sistemon. Programo **Grundtvig** subtenas la tutvivan klerigadon de plenkreskuloj. Programo **Leonardo** celas fakan ekzercadon kaj programo **Lingua** tutvivan lingvan klerigadon (vidu Komunan Eŭropan Referenckadron). Aliaj programoj ebligas interŝanĝon de junaj sciencistoj, kunlaboron de du najbaraj landoj k.s.

Ankaŭ nia **Esperanto-movado** estas principe kleriga projekto, kiu instruas ne nur la internacian lingvon, sed ankaŭ interpopolan toleron, ekkonadon de diversaj kulturoj, pacan kunvivadon de nacioj kaj rasoj. La ekstera mondo dediĉas al nia movado tiom da atento kaj zorgo, kiom da atento kaj zorgo ni mem dediĉas al la ekstera mondo kaj al ĝiaj projektoj. Se ni neglektas ilin, ni ne miru, ke la mondo simile malatentas niajn klerigajn klopodojn.

## Komuna Eŭropa Referenckadro

Eŭropa Unio nun komprenas plurlingvecon kiel **sumon** de ĉiuj lingvaj kaj kulturaj scioj kaj kapabloj, kiujn eŭropa civitano akiris per sia patralingva kaj fremdlingva studado. Tiamaniere ni lernas internaciajn vortojn kompreneblajn en la tuta unio, sed ankaŭ vortojn komunajn por la lingvoj slavaj aŭ ĝermanaj, same ankaŭ sociajn kutimojn, komunajn por la tuta unio aŭ por ĝiaj grandaj partoj. Tiuj komunaj elementoj ebligas almenaŭ simplan interkompreniĝon ankaŭ inter personoj, kiuj ne lernis la saman fremdan lingvon (simile kiel ni ĉeĥoj komprenas iomete polojn, rusojn, bulgarojn, kroatojn, eĉ se ni ne studis iliajn lingvojn).

La scio de fremda lingvo povas esti **baznivela, memstara aŭ profesinivela**, kio dependas ne nur de la lingvaj kapabloj de la studanto, sed ankaŭ de liaj praktikaj bezonoj por la supozata utiligo. La Eŭropa fremdlingva instruado celas, ke la studantoj ne lernu tro multe, sed nur tion, kion ili efektive bezonos en sia labora praktiko. Multaj lernantoj fiaskis, ĉar ili lernis, por kio mankis iliaj kapabloj kaj kion ili eĉ ne bezonis lerni.

La baznivela scio sufiĉas por plenigi demandilojn, indiki siajn nomon kaj adreson, kompreni la direkton al certa adreso, aĉeti manĝojn, kompreni surskribojn sur skatoloj, sendi simplan bildkarton, simple rakonti pri sia familio.

## Elektronikaj bibliotekoj

En 2005 Eŭropa Komisiono publikigis alvokon sisteme elektronikigi la kulturan heredaĵon, precipe librojn, sed ankaŭ bildojn, fotojn, sonojn kaj filmojn kaj disponigi ilin al la publiko en la interreto aŭ sur kompaktaj diskoj. Miloj da libroj en diversaj lingvoj jam en la reto ekzistas, sed oni celas milionojn da volumoj, veran multlingvan bibliotekon.

Feliĉe ne minacas danĝero, ke Esperanto en la biblioteko mankos, ĉar multaj esperantistoj jam longe sisteme enkomputiligas nian literaturon, sed bedaŭrinde nur private, ĉar mankas oficiala komuna pilota projekto de UEA. Eble la nova estraro montriĝos pli moderne pensanta kaj komprenos, ke en la epoko de elektronika civilizo Esperanto ne povas resti ekster la ludo, se ĝi ne volas iĝi eterna Cindru-lino.

## Turismaj informoj

En la nuna tempo ĉiu urbo, eĉ ĉiu vilaĝeto havas informojn por turistoj pri siaj vidindaĵoj en la interreto, kutime en la enlanda kaj angla lingvoj. Ekzistas do tutmonda turisma informaro anglalingva, kiu estas tage nokte je dispono por ĉiu retano en la mondo pri ĉiu ajn lando, urbo, vilaĝo. Ankorau pli oportuna sistemo kreskas en la reta enciklopedio Wikipedia, kie tiuj informoj kreas logikan sistemon, en

kiu la uzantoj povas facile orientiĝi kaj trovi tie ligojn al la oficialaj urbaj retejoj.

Nia movado havas ŝancon krei similan sistemon esperantlingvan kaj kompletigi tiel Pasportan Servon. En Vikipedio jam miloj da urboj estas prilaboritaj, sed plejparto kompreneble mankas. Sufiĉus traduki vikipediajn artikolojn el aliaj lingvoj (tio estas permesite), kion povas fari eĉ tiuj, kiuj mem ne havas komputilon, sed bone regas la lingvon. Oni povas printi por ili tradukotajn tekstojn.

Kompreneble, pli prestiĝa afero estas, se iu urbo konsentas meti esperantlingvan tradukon al sia oficiala retejo, sed ne ĉiu urbo akceptas tiun proponon (antaŭjuĝoj kaj malamikaj sintenoj ankoraŭ ekzistas). Plie la izolan urbon oni malfacile serĉas, la vikipedia artikolo estas bona ankaŭ en tiu kazo.

Verŝajne estus bone komenci krei turisman-arkitekturan vortareton pri memorindaĵoj, kie oni povus trovi esperantlingvajn esprimojn precipe por historiaj arkitekturaĵoj kaj iliaj elementoj, kiuj plej ofte stumbligas la tradukantojn.

Esperantigu vian civiton kaj ĝian ĉirkaŭaĵon, la tradukon iu el la vikipediistoj jam scios enmeti.

*Miroslav Malovec*



## 19-a IKF en Ústí nad Labem

tamen efektiviĝos: ekde la 30-a de novembro ĝis la 2-a de decembro 2007!

Vendrede la 30-an ekde la 17-a h. akceptado en la restoracio "Na Rychtě"; 18 h. ĝis 22 h. societa vespero kun vespermanĝo samloke.

Sabate ekde la 9.30 - 12.30 prelega matineo en "Základní umělecká škola E. Randové" en Churchill-strato (kiel pasinte). - Post komuna tagmanĝo ekde 14.30 spirita koncerto en Ruĝa preĝejo. - 18.30 bunta kultura programo denove en ZUŠ de Eva Randová (kiel matene). Dimanĉe ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo de Ústí nad Labem.

Tranoktado: Polica tranoktejo (strato Stříbrnická (trolebuso n-ro 53+55 ĝis halt. Elba aŭ 52 ĝis Orlická) (lito po 200 - 250 Kč, aŭ pensiono Ekopros, str. Sociální péče (lito po 220 Kč), event. hotelo Palace (290 - 390 Kč). -

Aliĝkotizo Kč 200 (pagota surloke en la akceptejo). - Aliĝlimdato: 10.11.07 - aliĝu ĉe la adreso: M. Smyčka, Dlouhá 20, 370 11 Čes. Budějovice, tel. 38 53 10 264, 721 962 612; [m.smycka@seznam.cz](mailto:m.smycka@seznam.cz). - (Eblas aliĝi dum la ĈEA-konferenco en Polička).

**Donacoj por la tombolo kaj programproponoj estas bonvenaj (indiku la temon kaj daŭron).**

## Lančov 2007

En la tri etapoj de la ĉi-jara Somera Esperanto-Tendaro en Lančov la infanoj lernis la lingvojn anglan, germanan kaj hispanan, tamen ili estis informataj ankaŭ pri Esperanto. En la tria etapo unu knabino eĉ forkuris el la angla kurso, kie ŝi enuis (ŝi jam tralegis la lastan volumon de Harry Potter en la originalo) kaj lernis intensive Esperanton. En la lasta semajno de tiu etapo deko da plenkreskaj esperantistoj diskutis pri la temo, kiel labori por Esperanto en la nuna tempo.

Fine de la tria etapo okazis jam la deka renkonto de iamaj tendaranoj, kiuj venadis dum sia juneco, kiam la tendaro estis ankoraŭ plene esperantista. Nun kunvenis kvindeko da personoj por rememori ankaŭ la fakton, ke la ĉi-jara tendaro estas jam la 55-a, kvankam la unuaj kvar okazis en aliaj lokoj (do venontjare okazos la 50-a sur la sama loko).

Ĉi-jare estis finita ankaŭ la konstruado de novaj duŝejoj kaj necesoj.





## Rezultoj de la seminario

Dum la dua semajno de la tria etapo en Lančov okazis malgranda seminario „Kiel labori por Esperanto en la nuntempo“, kiun partoprenis dek personoj, inter ili la prezidanto de la slovakaj esperantistoj Rastislav Šarišský. Estis konstatita neceso diskuti pri la problemo, entiri en la diskuton vastan membrobazon, sisteme konatiĝadi kun internaciaj klerigaj programoj, lerni akiri monon de sponsoroj kaj fondaĵoj, zorgi pri la kultura heredo de la antaŭaj generacioj de esperantistoj kaj instrui la membraron, kiel utiligi komputilojn kaj interreton por poresperanta laboro. Tiucele prepari kursojn por la membraro, ekzemple kiel prilabori turismajn informojn por la reto, enmeti ilin en Vikipedion aŭ proponi esperantigon de oficiala retejo al urbo aŭ vilaĝo. La partoprenantoj diskutis ankaŭ pri la tendaro en Lančov, pri ĝia esperantista estonto.

Grandan ŝancon Esperanto havas en la interreto, kie kreskas elektronikaj bibliotekoj kaj enciklopedioj, sistemoj de informoj por turistoj, planataj estas lernolibroj de fremdaj lingvoj kaj aliaj fakoj per Esperanto, sciencaj artikolaroj kun Esperanto kiel pilota lingvo. Por la konkretaj projektoj eblas serĉi monrimedojn de sponsoroj kaj mece-

natoj. Samtempe necesas instrui la esperantistaron pri projektoj ekster Esperantujo (Socrates, Gutenberg, Komuna referenckadro pri lingvoj k.s.).

Konkludo: la informa kampanjo inter la publiko kaj politikistoj devas esti ekvilibre akompanata de sistema konstruado de virtuala Esperanto-mondo en la reto, ĉar se ni sukcesos veki ies intereson, ĉefe ĉe gejunuloj, ili devas trovi en la reto sufiĉe da kursoj, vortaroj, beletra kaj faka legaĵo kaj ankaŭ informojn de enciklopedia karaktero, ĉar liverado de informoj apartenas al ĉefaj taskoj de internaciaj lingvoj.

## Seminario en Bahratal



De la 8-a ĝis la 11-a de junio 2007 okazis en la ĉelima germana urbeto Bahratal turisma kaj lingva seminario, kun prelegoj pri medicino, biero, ginsengo, korea muziko, Vikipedio kaj Bertha von Suttner.

## Infanoj kaj Afriko

Sabate la 9-an de junio 2007 Klubo de Esperanto-amikoj en Svitavy aranĝis Infanan tagon, en kiu partoprenis ankaŭ junaj esperantistoj el la pola urbo Rybnik. La 48 kunvenintoj vizitis ekspozicion de afrikaj bestoj kaj trofeoj ĉe sinjoro Miroslav Ducháček en Banín, ekspozicion de LEGO-kubetoj en la Urba muzeo de Svitavy kaj konkursojn kaj scenetojn en la Pedagogia-psikologia konsultejo en la strato Riegrova. Por s-ro Ducháček, kiu ĝuste festis naskiĝtagon, la infanoj kantis kanton de Zdenka Novotná el Česká Třebová, kaj li poste rakontis pri siaj vojaĝoj tra Afriko. En la muzeo la infanoj admiris LEGO-modelon de la stacidomo kaj de la muzeo mem, kelkaj geknaboj provis ankaŭ ion konstrui. Poste ili konkursis pri scioj de Esperanto kaj prezentis fabelajn scenojn.

*Libuše Dvořáková*



## Laŭ spuroj de Švabinský

Sabate la 16-an de junio Esperanto-klubo Amikeco Česká Třebová organizis someran balon por 40 alvenintoj. Antaŭtagmeze Jiří Pištora ĉiĉeronis tra la urbo, posttagmeze Jiřina Kučerová gvidis promenon al la vilaĝo Kozlov. Tie staras domo n-ro 50, kien en 1895 Max Švabinský venis kun sia amikino kaj posta edzino Ela Vejrychová. La loka pejzaĝo inspiris la junan pentriston krei multajn verkojn. Sian dometon li ornamis kune kun Otakar Vaňáček kaj sia bofrato Rudolf Vejrych la juna per la sceno “Sankta Venceslao akceptas donacojn“. Sur la fasado de la najbara biendomo li kreis sgrafiton „Falĉistino“.



La promeno finiĝis en restoracio Na Horách (En la montaro), kiun iam vizitadis verkistino Božena Němcová. Tie prezentis siajn kantojn kaj fabelojn infanoj el Opatovec kaj Česká Třebová sub la gvido de sia kursestrino Zdenka Novotná. Poste sekvis muziko, danco kaj tombolo.

*Libuše Dvořáková*

## Invito el Svitavy

La 6-an de oktobro 2007 realiĝos esperantista renkonto en Svitavy. Kolektiĝo de partoprenantoj je 9.20 antaŭ la fervoja stacidomo, poste per speciala buso ili ekskursos al Banín por rigardi la ekspozicion de afrikaj trofeoj, por spekti videon kaj aŭskulti rakontadon pri aventuroj el la afrika



naturu. Ĉar necesas mendi la buson (kaj ankoraŭ unu surprizon) ni petas tuj konfirmi la partoprenon je la adreso [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz) (tel: 461532 257)

## Maigret kvaran fojon

Antaŭ kelkaj tagoj eldonejo "Sezonoj" aperigis la libron "La flava hundo" de Georges Simenon. Ĝi estas la kvara libro pri komisaro Maigret en Esperanto post "Maigret hezitas" (1999), "Maigret kaj la maljuna damo" (2002) kaj "Amiko el la junaĝo de Maigret" (2004). Ĉiuj estas tradukitaj de Daniel Luez (Francio). La originalo unuafoje aperis en 1931. La traduko kostos ĉ. 12 EUR.

**Beletra Almanako**  
N-ro 1 (Septembro 2007)  
ISBN 978-1-55569-071-5 / ISSN 1932-3325

Redaktas: Jorge Camacho (Belartaj Konkursoj), István Ertl (Mondial)

La rezultoj de la Belartaj Konkursoj 2007 de UEA, la rezultoj de la Unuiĝo 2007 de Osmoto.

"Mi ĉiam estis ruzman, ĉiam ruzman, ĉiam ruzman. Ne longe ti efektos kontraŭ la amboj pri ĉi tiu afero..."

Kaj krome: Eliade de Kock en "Priamo kaj antaŭ"

Originaj poezioj kaj poezioj tradukitaj de: ...

Originala prozo: Luiza Carol: *Ĉu vi scipovas ludi Tomlandilon?* - Den Drown: *Florbrasikoj kaj aligatoroj* - H. Laxness: *La libera linio* - J. Camacho: *Lingvaj manipulistoj*

Prizitaj tradukoj: Daniel Luez (Francio) pri komisararo Maigret en Esperanto post "Maigret hezitas" (1999), "Maigret kaj la maljuna damo" (2002) kaj "Amiko el la junaĝo de Maigret" (2004).

Truko: Jorge Camacho: *La flava hundo* - Daniel Luez (Francio)

Recenzoj: Melnikov, Camacho kaj rezultoj de Belartaj Konkursoj.

**MONDIAL NOVJORKO** [www.librojosek.com](http://www.librojosek.com)

La eldonejo Mondial en Novjorko eldonas unuan numeron de Beletra Almanako, redaktata de Jorge Camacho, Probal Daŝgupto kaj István Ertl.

Post prezento de la almanako sekvas originalaj rakontoj (Luiza Carol: *Ĉu vi scipovas ludi Tomlandilon?* kaj Den Drown: *Florbrasikoj kaj aligatoroj*) poemoj de pluraj aŭtoroj (Ertl, Janičič, de Kock, Mao Zifu, Nervi, Ragnarsson), tradukita literaturo (Eliade, H. Laxness, Ŭakajama, Ghosh), eseoj (B. Ragnarsson: *La libera linio*, J. Camacho: *Lingvaj manipulistoj*), recenzoj (Melnikov, Camacho) kaj rezultoj de Belartaj Konkursoj. La apero de la almanako estas planata je fino de septembro 2007.

## INTERNACIA PAROLIGA SEMAJNO


Jam tradicie InPaSem okazos en Dobřichovice, ĉi-foje senpere post la konferenco de ĈEA. Ni esperas, ke almenaŭ iuj el la eksterlandaj partoprenantoj venos pli frue por povi ĉeesti ankaŭ nian konferencon. Kiel tradicie, la kurson de komencintoj gvidos per Ĉe-metodo Stano Marček el Slovakio uzante sian sukcesplenan lernolibron Esperanto per rekta metodo, la seminarion por progresintoj gvidos alterne Marek Blahuš kaj Petro Chrdle.

Oni diligente studos ĉiun antaŭtagmezon, dum posttagmezo oni ekskursos al Prago kaj Bohemia Karsto. Se vi intencas partopreni kaj ne ankoraŭ aliĝis, bv. decidiĝi se eble tuj, ĉar ni jam devos baldaŭ fermi la ĉambroliston por la pensio kaj malmendi la neuzotajn ĉambrojn. Sabate la 29-an de septembro estos tradicie renkontiĝo de la kursanoj kun ĉeĥaj esperantistoj, al kiu estas kore invitataj ĉiuj interesatoj. Por kompletigo, ĝis nun aliĝis krom ĉeĥoj partoprenantoj el Francio, Svisio kaj Germanio. Informoj: <http://www.kava-pech.cz/inpasem> aŭ ĉe [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz).

### Prelegaro pri Kořínek kaj Pumpr

En la domajno [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) sub *Esperanto od A do Z, Dokumenty* estas nove trovebla prelegaro pri Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr el decembro 2006. Ĝi estas elŝutebla en PDF-formato. Samtempe tie aperas en formato MP3 sona intervjuo kun J. Kořínek farita de V. Novobilský antaŭ dudeko da jaroj.

## VIRTUALA EKSPOZICIO PRI ESPERANTAJ BILDKARTOJ



La ekspozicio prezentas 1439 fabrike produktitajn Esperantajn poŝtkartojn. La kompilantoj estos dankaj, se vi povus klarigi nekonatajn kartojn. Kaj se vi alsendos Esperantan bildkarton, ne troviĝantan ĝis nun en la ekspozicio, volonte oni aldonos ankaŭ vian nomon al la listo de subtenantoj-kunkolektantoj. Ĉiukaze, nepre vizitindas: <http://www.eventoj.hu/bildkartoj/index.htm>

Gratulon al la kompilantoj de tiu unika montrofenestro de Esperantujo!! (Estas tie 90 ĉeĥaj kaj 25 slovakaj bildkartoj)

### Centjariĝa simbolo

En 2008 festos UEA sian centjariĝon. Okaze de tiu jubileo en konkurso pri nova simbolo venkis proponoj de la 24-jara kataluna dezajnistoj Guillem Sevilla.



## Team Esperanto

### invitas vin helpi

La usona projekto Gutenberg prezentas en la reto 20 000 librojn, kiuj estas libere kaj senpage elŝuteblaj (2 milionoj da elŝutoj ĉiumonate). Inter ili estas nun 29 libroj en Esperanto, kiujn enmetis kolektivo Team Esperanto, konsistanta el 24 usonanoj. Inter tiuj libroj estas du ĉeĥaj, nome *Rakontoj* de J. Arbes kaj *Komenio* de J. V. Novák.



Por enmeti novajn librojn necesas trakti kun la administrantoj angle kaj pruvi, ke la prezentata verko estas libera. Tio signifas, ke la aŭtoro kaj tradukinto mortis antaŭ 70 jaroj aŭ donis permeson pri publikigo aŭ la libro aperis antaŭ 1923 (ĉi tiu lasta kondiĉo validas nur en Usono). Team Esperanto proponas helpon por la traktado al esperantistoj, kiuj havas taŭgan verkon en elektronika formo kaj volus ĝin donaci al la projekto Gutenberg.

Estas dezirinde, ke en la projekto aperu almenaŭ 51 libroj, ĉar poste Esperanto aperus inter deko da privilegiaj lingvoj ĉe Gutenberg. Se vi volas kunlabori, iru al la esperantlingva diskutejo Gutenberg <http://groups.yahoo.com/group/PorGutenberg/>

Nun tie estas jenaj aŭtoroj: Alcott, Arbes, Burroughs, Carroll, Defoe, Fryer, Harte, Hauff, Hawthorne, Hayes, Ibsen, Irving, Novák, Reed, Twain, Wharton, Zamenhof.

-mm-

## Projekto Lingvolanĉilo

Projekto kaj laborgrupo en Britio „Lingvolanĉilo - Springboard to languages“ (= saltotabulo al lingvoj) celas uzi Esperanton kiel enkondukan rimedon por la lernado de fremdaj lingvoj. Ĝia celo ne estas instrui Esperanton, sed pere de ĝi konsciigi pri lingvolernado. Ĉiu infano ricevu *gepatralingvan* edukon ĝis sia 8-a jaro, inter la 9-a kaj 11-a jaro lernu Esperanton kiel modele regulan fremdan lingvon kaj ekde la 12-a jaro ĝis abiturienta ekzameno la geknaboj studu iun elektitan nacian lingvon. En gimnazioj ofte aperas problemoj, ke iliaj infanoj venis el diversaj elementaj lernejoj, en kiuj ili lernis alian fremdan lingvon kaj nun ili vizitas komunan klason - do en kiu lingvo daŭrigi? Anglaj infanoj plie ne emas lerni fremdajn lingvojn, ĉar ili kredas, ke ilia gepatra lingvo jam fariĝis internacia. La projekto do volas per ludado vekti ĉe britaj infanoj intereson pri lingvoj.

## Projekto BE-LL

"UNUIGI LA INFANOJN ĈIRKAŬ LA MONDO PER ESPERANTO-MAŜINO" La ideo estas krei softvaron kaj enmeti ĝin en telefonaparaton (aŭ alian, laŭvole). Ĝi estos praktika por la ĉiutaga vivo. Oni parolos en nacia lingvo kaj la maŝino ripetos ĉion en Esperanto kaj kiam oni parolos en Esperanto, la maŝino ripetos en la nacia lingvo, t. e. la maŝinoj povos interkomunikiĝi! Aldone oni vidos la vortojn sur ekrano. Ni serĉas helpon por efektivigi nian projekton. Interesuloj kontaktu nin. Dankon! [ed1son51@hotmail.com](mailto:ed1son51@hotmail.com).

## Esperanto antaŭ grava publiko en Berlin


La germana revuo *Esperanto aktuell* 4/2007 alportas informon, ke la 22-an de junio 2007 okazis en Berlino parol-duelo pri lingva politiko de Eŭropa Unio, sub sloganoj „ĉiuj lingvoj“, „nur la angla“ kaj „nur Esperanto“. La publiko konsistis el funkciuloj de ŝtataj institucioj, de Eŭropa Unio, de ambasadejoj, do homoj imunaj kontraŭ novaj ideoj. Esperanton reprezentis d-ro Rudolf Fischer, kiu klopodis ne tiom persvadi, kiel informi pozitive pri Esperanto-movado. La unua preleganto Peter Altmeier atentigis, ke la internacia angla ne estas tiu de Oksfordo, sed kruda ĵargono nomata Globish, kiu apenaŭ povas reprezenti anglan kulturon. Pro tio neniu kuraĝis ataki Esperanton, ke ĝi havas iajn lingvajn aŭ kulturajn mankojn, tamen oni persistis, ke la angla nun estas necesa kaj facila, sekve Esperanto ne estas bezona. Jochen Richter el la teamo de Leonard Orban, komisaro de EU por lingva diverseco, asertis, ke la tradukado el ĉiuj lingvoj al ĉiuj funkcias, do interlingvo estas superflua. D-ro Fischer oponis, montrante, kiel tradukantoj al la hispana fuŝis la paroladon de prof. Selten en EU (anstataŭ „la infanoj lernu unue

Esperanton kaj poste iun nacian lingvon“ aperis hispane „la infanoj lernu unue Esperanton kaj poste sian nacian lingvon“). Fina konkludo de la artikolo: De politikistoj ni atendu neniun aktivan subtenon de Esperanto. Ni alstrebu per pozitivaj informoj atingi la toleron oferti Esperanton libervole en lernejoj.

## Diskuto en ĉeĥa televido

La ĉeĥlingva parlamenta televido 24CZ elsendis en junio gazetaran konferencon kun la eŭrokomisaro Vladimír Špidla. Tie eksonis ankaŭ opinioj pri solvo de la lingva situacio en Eŭropo. Iu sinjoro el la publiko proponis, ke laŭ modelo de Usono oni enkonduku devige la anglan kiel la plej riĉan lingvon. V. Špidla respondis, ke Eŭropo aplikas malan principon ol Usono. Dum tie regas slogano „ĉiuj en unu“ (ĉiuj nacioj parolu angle), Eŭropo volas „unuecon en diverseco“. Ĉiujn lingvojn necesas konservi kaj gardi, ĉar multaj ideoj estas eblaj sole en iu konkreta lingvo, en aliaj lingvoj tiuj ideoj eĉ ne venus en la kapon de la homoj. V. Špidla opinias, ke EU povus solvi la problemon per la latino, per la angla, per la angla nur ĉe instancoj, aŭ per teknika helpilo (tradukmaŝino enpoŝe). -mm-

**MI ESTAS HOMO.** *Originalaj verkoj de L.-L. Zamenhof. Kompilis, redaktis, komentis kaj enpaĝigis Aleksander Korĵenkov. Kaliningrado, Sezonoj 2006. 288 paĝoj.*



La titolo de la libro (Mi estas homo) estas esperantigo de la latina frazo *Homo sum*, kiun en rusa formo *Gomo sum* uzis Zamenhof kiel sian pseŭdonimon, per kiu li subskribis sian ruslingvan broŝuron pri hilelismo, prototipo de homaranismo (1901). Zamenhof dum sia tuta vivo celis kunfratigon de la homaro kaj Esperanto estis nur parto de liaj klopodoj. En tio li similas al nia ĉeĥa samlandano Komenio (1592-1670), kiu celis edukadon de la homaro kaj kalkulis ankaŭ kun iu estonta planlingvo (panglotio). Sed Komenio estas admirata pro siaj pedagogiaj verkoj, male panglotio estas menciata nur kiel naiva revaĵo, dum Zamenhof estas rekonata kiel kreinto de la plej sukcesa planlingvo, sed liaj homaranaj klopodoj estas menciataj nur kiel

akcesora naivaĵo, kiun oni ne prenas serioze.

La nova libro kolektis ĉiujn akireblajn tekstojn, kiujn Zamenhof verkis pri siaj strebadoj cionismaj kaj homaranismaj, kaj kompletigas lian portreton el nova vidpunkto. Pluraj el la prezentitaj artikoloj estis verkitaj en la lingvoj rusa, germana aŭ jida, sekve la libro prezentas ilin en traduko de aliaj personoj, sed pro tio Zamenhof ne ĉesas esti ilia aŭtoro. La tradukoj estas bonaj, oni preskaŭ ne rimarkas, ke la esperantigon ne faris la aŭtoro mem, nur kelkajn perfidas la vortoj *judo* kaj *nacio*. Zamenhof ĉiam nomis sin *hebrea gento*, ne *nacio*, ĉar modernaj nacioj estas miksaĵo de pluraj gentoj, de pluraj etnoj.

La unuan artikolon *Kion do finfine fari?* verkis ruslingve la 23-jara Zamenhof por siaj hebreaj samgentanoj. Detale li priskribas la suferadon de la hebrea popolo dum jarmiloj, kaj venas al konkludo, ke la suferado finiĝos nur tiam, kiam la hebrea kolonio iun dezertan landon kaj kreos tie propran ŝtaton. Li rekomendis Usonon, ĉar en Palestino kontraŭ ili senĉese batalus malamikaj gentoj.

Samtempe li opiniis nereala renovigi la antikvan hebrean lingvon, sed rekomendis la jidan, kies gramatikon li prilaboris (ĝi restis nur en manuskripto). Jam pli frue li sukcesis fondi en Varsovio cionisman societeton de hebrea junularo kaj en aliaj urboj filiojn.

Sed jam en la sama jaro 1882 en alia artikolo *Sub la komuna standardo!* li ŝanĝis sian opinion vidante, ke ĉiuj sopiras Palestinon aŭ volas serĉi ĉiu en aliaj landoj, do sole Palestino povas unuigi ĉiujn. Al Palestino forvojaĝis junulara grupo Bilu, sed Zamenhof ne estis kontenta pri ilia agado kaj prezentis sian kritikon en *Letero al la anoj de Bilu*. Poste li tute ŝanĝis sian mondkoncepton kaj opiniis la cionismon kontraŭa al la principoj de homaranismo. (Sed ni ankoraŭ menciui, ke en 1924 esperantlingve aperis broŝuro *Hebrea progreso en Palestino*, el kiu ni ekscias, ke en 1906 aperis multaj tendoj sur dezerto, kiun ĉiuj mondpotencoj kredis nekultivebla kaj vendis ĝin al la cionisma movado. Sed la entuziasmo de junaj hebreoj estis tiel granda, ke post dek jaroj tie elkreskis moderna grandurbo Tel-Avivo kaj en aliaj pluraj lokoj similaj urboj kaj vilaĝoj, kiuj la dezerton ŝanĝis en florantan ĝardenon. Zamenhof eraris, ke ne eblas renovigi la antikvan hebrean lingvon, kiu nun estas oficiala lingvo de Israelo, sed li ne eraris, ke la hebrea ŝtato estos celo de atakoj flanke de najbaroj.)

La artikolo *Hilelismo* baziĝas sur eldiro de la antikva hebrea filozofo, rabeno Hillel (ĉ. 80 a.K.- ĉ. 10 p.K.) **„agu kun aliaj, kiel vi volas, ke ili agu kun vi, ne faru al via proksimulo tion, kio estas malagrable al vi“**. En tiu principo Zamenhof vidis solvon de ĉiuj interhomaj, intergentaj

kaj interreligiaj rilatoj, ĉar se ĉiuj tiel kondukus, ĉiuj malpacoj kaj konfliktoj ĉesus. Zamenhof konsideris maljustaĵo, ke la majoritata gento en iu lando opinias sin posedanto de tiu lando kaj ĉiujn minoritatojn prenas kiel fremdulojn, kvankam ili tie naskiĝis, kaj estis tie entombigitaj iliaj gepatroj, geavoj kaj aliaj antaŭuloj. Laŭ lia opinio ĉiu lando devas aparteni al ĉiuj homoj, kiuj en la lando naskiĝis kaj por kiuj ĝi estis patrio, sendepende el kiu gento ili devenas. Pro tio la ŝtatoj ne rajtas havi la nomon laŭ la ĉefgento (Rusio, Pollando), sed nomon nacie neŭtralan, ekzemple laŭ la ĉefurbo (Peterburglando, Varsovilando) kaj ĉiuj nacioj kaj naciecoj devas esti egalrajtaj. Li eĉ revis pri „Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo“ (p. 230), kie ĉiu homo estus taksata laŭ siaj personaj kvalitoj. Dume li vidis, ke poloj protestas, kiam rusoj subpremis ilin, sed ili mem subpremas hebreojn kaj aliajn minoritatojn en sia teritorio, kaj li timis, ke hebreoj intencas fari la samon en Palestino. Tio estis motivo, kial li forlasis la cionisman movadon kaj serĉis alian solvon, kiu helpus ne nur al hebreoj, sed al ĉiuj homoj en la mondo.


Sed unu afero estas imago, alia afero klarigi ĉion tiamaniere, ke ĉiuj komprenu, konsentu kaj komencu labori por realigo de la ideo. Por ne endanĝerigi Esperanton, li sekretigis, ke li mem estas aŭtoro de homaranismo kaj propagandis ĝin anonime. Li ne eraris, kiam li atendis rifuzan rea-



gon precipe de religianoj, kiuj opinias sian propran religion sole pravan kaj elektitan de Dio mem regi super la mondo, tial unuiĝo de religioj estas por ili ne akceptebla. Malgraŭ tio la kolektitaj materialoj donas al ni portreton de Zamenhof el iom alia angulo de vidpunkto ol estas la tradicia kaj kompletigas niajn sciojn pri lia persono kaj pri liaj tutvivaj strebadoj.

*Miroslav Malovec*

## Simbolo de frateco

 La fiŝo estas kristana simbolo, kiu estis uzata de la prakristanoj kiel ekkonilo aŭ sekreta signo; unu persono desegnis arkon en la sablon kaj alia kompletigis la simbolon per la ĉirkaŭarko kaj montris sin per tio kiel frato aŭ fratino en Kristo; hodiaŭ oni uzas ĝin ankaŭ kiel etiketon sur aŭtomobilo.

*(laŭ Dia regno)*

## Koncize

- Pola Esperantisto ĉesos aperi ekde la nova jaro pro malmultaj abonantoj kaj kunlaborantoj
- Jarkunsido de KELI en la pola Pelplin kiel sekretarion elektis Pavel Polnický
- La venonta IKUE-kongreso efektiviĝos en Rimini kaj KELI-kongreso verŝajne en Slovakio
- Dum nia asocia konferenco en Polička estos je dispono konferenca stampilo kaj poŝtmarkoj kun konferenca alpresaĵo
- La prezidanto de TEJO David-Emil Wickström demisiis pro familiaj kaj laboraj motivoj. La funkcion nun plenumas la vic-prezidanto Haris Subašić.

## La kongresa „filmo“

de Miloš Bloudek



*La kongresejo*



*Margit Turková legas el Eli Urbanová*



*Te-ceremonio*

## Instruista kursaro

Universitato Adam Mickiewicz en la pola Poznano kaj ILEI kune organizas internacian instruistan kursaron. La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka semajna sesio (la unua okazos 15-21.09.2007 kaj la dua 2-8.02.2008), intertempan hejman laboradon, retan konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kaj fina ekzameno okazos en septembro 2008. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista kursaro.

Kondiĉo: bona lingvoscio, baza kono de Esperanta kulturo, plie abiturienta ekzameno. Partoprenkotizo: A-landoj: 360 EUR, B-landoj 125 EUR por unu semestro.

Programo: **Lingvopedagogio** (Bazaj faktoroj de lingvopedagogio, Esperanta metodiko, Instruhelpiloj de instruista kofro ĝis rekursoj), **Esperanta kulturo** (Plej gravaj eventoj de historio de Esperanto, Ĉefaj periodoj de E-literaturo, Tiklaj punktoj de E-gramatiko, Lingva trejnado). Kiel **donacon** la partoprenontoj ricevos: *Problemojn de la nuntempa E-movado* (Humphrey Tonkin), *Nuntempa literaturo* (István Ertl), *Psikologiaj aspektoj de komunikado* (Claude Piron), *Interkultura komunikado* (Ilona Koutny)

Aliĝo ĉe: [ikoutny@amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl)

D-rino Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj Universitato Adam Mickiewicz, al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznan

<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

## Nia originala literaturo

**Londonanidoj** de Donald W. Munns (1930-1945) estas originala romaneto, kiun la 14-jara aŭtoro verkis unu jaron antaŭ sia subita morto rekte en Esperanto post 15-monata lernado de la lingvo. La verketo montras grandajn lingvan kaj verkistan talentojn de la infana aŭtoro, sed estas ankaŭ pruvo pri facileco kaj elasteco de Esperanto. La 98-paĝa libreto aperis en 1946.

En 1939, kiam Londono kaj aliaj grandaj urboj de Britio estis atakotaj de Germanio, oni sendis milojn da infanoj al kamparo, por tie transvivi la danĝeran periodon en relativa sekureco. Donald Munns, kiu mem apartenis al tiuj infanoj, rakontas pri dudek tri geknaboj el la londona Gordon-lernejo, kiuj kun sia instruisto Fraŭlino Burdon estis venigitaj en nenomitan vilaĝon kaj loĝigitaj en privataj domoj. Komence ili havis problemojn kompreni la lokan dialekton kaj montriĝis ankaŭ diferencoj kulturaj, pro kiuj londonanoj kaj vilaĝanoj reciproke opiniis sin misedukitaj.

La infanoj antaŭtagmeze vizitadis lernejon, posttagmeze kun la instruistino entreprenadis ekskursojn, konstruis baraĵon en la rivereto por fari basenon, en kiu ili povus naĝi. Knaboj ludis per pilko aŭ specialan ludon per kaŝtanoj. Foje ili renkontis alian londonan lernejon, el Trig-strato, kaj interkonsentis „batalon“ en proksima forlasita ŝtonminejo. La rakonto priskribas, ke la feminisma movado penetris ankaŭ en la infanan kolektivon - la Gordonanoj venkis la batalon danke al siaj emancipiĝintaj knabinoj. Per la venko en la batalo la rakonto finiĝas.

-mm-

## Vítkovice kaj Poruba

Preskaŭ tradicie renkontiĝis la 6-an de junio 2007 kluboj el Vítkovice kaj Poruba en arbareto de familio Neuvirt por amuzi sin kaj babiladi. Ovaĵo, kolbasoj, bona vino, iom da muziko kaj kantoj kun belega vetero igis ĉiujn bonhumoraj. Je venonta renkontiĝo ni ĉiuj ĝojas. Tiu okazos aliloke, ĉe s-ro Suchánek.

*Milan Neuvirt*



## Věra Ludíková en Naše rodina

La ĉeĥlingva revuo *Naše rodina* (Nia familio) 33/2007 publikigis interparolon kun poetino Věra Ludíková kaj fragmenton el ŝia libro *Pošli to dál* (Sendu ĝin pluen). En la biografia noto ni trovas mencion pri Esperantaj tradukoj de ŝia poezio. Oni demandis ŝin, kiamaniere oni fariĝas poeto, kiuj aŭtoroj ŝin influis, kiun el siaj propraj libroj ŝi plej multe ŝatas, kion ŝi konsilus al komencantaj aŭtoroj, kio helpus al la Verkista Asocio k.s. La respondojn vi trovos ankaŭ en ŝia retejo

<http://mujweb.cz/Kultura/bergrova/NR33-12.htm>.

## Pozitivní noviny

Ni jam menciis (p. 77) la artikolon de M. Sígľ pri la libro de Z. Bergrová „Kosmo sonorás per steloj“ en la reta revuo *Pozitivní noviny* (Pozitiva ĵurnalo) kun priskribo de Esperanto-movado. En la rubriko *Ohlasy* (Eĥoj) oni publikigis reagon de Margit Turková ([www.pozitivni-noviny.cz/cz/clanek-2007060013](http://www.pozitivni-noviny.cz/cz/clanek-2007060013)), en kiu ŝi priskribis la propagandon de la ĉeĥa literaturo en Jokohamo per la menciita libro, aludis pri KAVA-PECH kaj Kurisu Kei. Samtempe ŝi ricevis retan respondon, ke la redakcio havas intereson skribi ankaŭ pri aliaj esperantistaj artistoj (Seemannová, Karen, Rumler, Vidman, Urbanová), kiujn ŝi menciis en akompana ret-mesaĝo. La retejo *Pozitivní noviny* multe da spaco dediĉas al ĉeĥa kulturo, ofte al personoj, kiuj ne estas tiom konataj, kiom ili meritis.

## Ĉeĥa Radio pri Verda Stacio

La 5-an de aŭgusto 2007 elsendis la Ĉeĥa Radio rememoron pri la iama esperanta elsendado en Brno Verda Stacio. Redaktoro Josef Veselý sub titolo „Ĉeĥio - lando nekonata“ rakontis, kiel la stacio propagandis nian patrujon pere de la internacia lingvo kun helpo de František Kožík kaj Karel Höger.

Poste li klarigis la historion de la internacia lingvo ekde Komenio. Interese estas, ke li trovis en la arkivo unu gramofondiskon kun la himno Espero en interpreto de etaj kantistoj de Bakula. En la Praga arkivo restis Najado, sed tiun ni konas. Vidu: [www.rozhlas.cz/olomouc/kultura/\\_zprava/366274](http://www.rozhlas.cz/olomouc/kultura/_zprava/366274)

## Nova faka reta gazeto

En la retejo <http://gchmin.ic.cz/> oni trovas novan fakan gazeteton *Geochemie a mineralogie*, kiu havas instrukciojn ankaŭ en Esperanto. Plie Esperanto apartenas al la ĉefaj lingvoj de la gazeto kune kun la ĉeĥa, slovaka, angla, germana kaj hispana, kiujn scias la redakcianoj. La lingvoj franca, rusa kaj pola estas allasataj ankaŭ, sed necesas prijuĝo de eksteraj laboruloj. La retejon kunfondis juna esperantisto, geologo Václav Procházka.

## E-ĉemizoj rete

Se vi interesiĝas pri ĉemizoj kun Esperanto-motivoj, vizitu la retejon <http://zope.saluton.dk/sea/peter>, kiu proponas sufiĉe riĉan sortimenton.

## Unua premio al Ĉeĥio

Jaroslav Krolupper gajnis unuan premion en la Internacia Literatura Konkurso EKRA-2007, kiun organizas Domo de Kulturo „D-ro Ivan Kirĉev“, Bulgario. Liaj poemoj aperos en Literatura Foiro. La unuan premion li gajnis ankaŭ pasintjare, sed kune kun kvar aliaj personoj.

## Kunlaboro de pensiuloj

La 80-jara Ernst Malzer el la aŭstra Mistelbach proponas kunlaboron de pensiuloj el Aŭstrio, Ĉeĥio, Hungario kaj Slovakio. Interesatoj skribu al lia reta adreso: [ernst.malzer@inode.at](mailto:ernst.malzer@inode.at).

## Konkurso pri sakroj

Norvega Esperanto-junularo aranĝis retan konkurson pri sakroj por pruvi, ke malgraŭ la antaŭjuĝoj Esperanto kapablas esprimi ankaŭ fiaĵojn. Partoprenis gejunuloj el Brazilo, Britio, Francio, Germanio, Hispanio, Italio, Kroatio, Nederlando, Norvegio, Portugalio, Usono. Inter tre fortaj esprimoj publikeblas nur *Vi estas pli delikata ol felo de fekaĵo* el Hispanio. La ceterajn sakrezultojn la blasfememaj interesatoj trovos ĉe:

[www.esperanto.no/nje/eo/konkurso.php](http://www.esperanto.no/nje/eo/konkurso.php).

## La Esperanto-urbo

La 11-an de julio 2006 la germana urbo Herzberg am Harz estis oficiale proklamita la Esperanto-urbo, kion oni povas legi en la oficiala urba retejo <http://www.herzberg.de>.



La urbo troviĝas ĉ. 70 km oriente de Paderborn, fama centro de esperantistoj. La retejo havas kompreneble sian Esperanto-version, en la urbo estas informoj por turistoj en Esperanto, okazas kursoj, unu el restoracioj preparis Esperanto-salaton, loka gimnazio kunlaboras kun gimnazio en Budapeŝto esperantlingve, realiĝis pluraj esperantistaj renkontiĝoj.

## Odvozování slov

V minulém čísle jsme si povídali o slovním charakteru kořenů. Nyní si povíme, jak se z kořenů skládají další slova. Složené slovo se skládá z hlavního prvku (*ĉefelemento*), který se nachází na konci složeniny, a vedlejšího prvku (*flankelemento*), který je na začátku a upřesňuje hlavní prvek. Např. *skribmaŝino* je psací stroj, kdežto *maŝinskribo* je strojové písmo. Psát na stroji se musí vyjádřit jako *maŝinskribi*, nikoliv *skribmaŝini*, protože hlavní je zde sloveso *skribi* (psát), kdežto upřesnění, že píšeme strojem, je až vedlejší. Podobně se luk řekne *pafarko* (stříleci oblouk), kdežto střílet z luku je *arkpafi* (obloukem střílet).

Pokud je hlavním prvkem podstatné jméno, může vedlejší prvek vyjadřovat materiál (*materialo*) nebo vztah (*rilato*) nebo přívlastek (*epiteto*). Např. *paperskatolo* je papírová krabice, krabice z papíru. Naproti tomu *paperkorbo* vyjadřuje koš na papír (odpadkový koš), koš je vyroben z jiného materiálu (proutí nebo plast), ale k papíru má určitý vztah, slouží k jeho sbírání, ale nejen papíru, všech odpadků, papír je však nejčastější. Třetí případ, totiž přívlastek, se vyskytuje hlavně u osob: *kuracisto-esperantisto*, *tajloro-lernanto* tedy lékař esperantista, krejčovský učeň (lékař, který je zároveň esperantistou, krejčí, který je ještě učněm).

Tradiční esperantské mluvnice ozna-

čují tyto tři případy písmeny M (*materialo*), R (*rilato*) a E (*epiteto*). První dva případy jsou dány pouze společenskými zvyklostmi, nikoliv nějakým mluvnickým pravidlem. Krabice se obvykle dělají z papíru, kdežto koše se většinou dělají z jiného materiálu a ke sběru papíru pouze slouží. Ale teoreticky může existovat i papírový koš a dost prakticky se používají krabice na papír, totiž pod schránkami v domě, kam nájemníci rovnou vyhazují reklamy, kterými mají schránky přecpány. V těchto případech je nutno upřesnit (*papera korbo*, *korbo el papero*, *skatolo por kolekti paperon*).

Složeniny mají výhodu ve stručnosti, ale nevýhodu v možnosti dvou různých výkladů. Např. *lignoŝraŭbo* může být šroubem ze dřeva i kovovým šroubem do dřeva (vrutem). Zde rozhodla dohoda mezi techniky, že budou tento výraz používat pro druhý případ (vrut), kdežto pro první stačí dvouslovný výraz *ligna ŝraŭbo*. Také *infanĉareto* (dětský kočárek) lze chápat dvěma způsoby: jako velký kočárek, v němž maminka veze miminko, nebo jako dětskou hračku, v němž holčička má panenku. V těchto případech lze upřesnit jako *beboĉareto* a *pupĉareto*.

Ještě je třeba si pamatovat, že podstatné jméno jako hlavní prvek dělá z vedlejšího prvku také podstatné jméno, i když jeho slovní kořen je jiný. Např. *belreĝino* není *bela reĝino* (krásná královna), nýbrž *reĝino de belo* (královna krásy) v dívčí soutěži.

# KALENDARO 2007

■ **12.-16.9.2007: Konferenco de IKEK** (Internacia Kolektivo de Esperantistoj-Komunistoj), Dobřichovice, inf.: [dieter.rooke@tiscali.ch](mailto:dieter.rooke@tiscali.ch)

■ **21.-23.9.2007 Konferenco de ĈEA (Polička)** Inf.: [podhradaska@volny.cz](mailto:podhradaska@volny.cz)

■ **24-30.9.2007: Internacia Paroliga Semajno (InPaSem)**, kurso de Esperanto por komencintoj kaj lingva seminario por jamaj parolantoj, Dobřichovice. Informoj: [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

■ **6.10.2007 Renkontiĝo en Svitavy**

**12/14.10.2007 Jarkonferenco de Ĉeĥa sekcio de IFEF en Liberec.** Inf.:

[AnnaAbelovska@seznam.cz](mailto:AnnaAbelovska@seznam.cz)

■ **15.-21.10.2007 Semajna lingva seminario en pensiono Espero en Skokovy.** Aliĝu ĉe Jindřiška Drahotová, Sadová 745, 293 01 Mladá Boleslav, telefono 326 731 845, reta adreso:

[drahotovaesperanto@seznam.cz](mailto:drahotovaesperanto@seznam.cz),

[www.mlboleslav.cz/esperanto](http://www.mlboleslav.cz/esperanto)

[www.sweb.cz/espero.skokovy](http://www.sweb.cz/espero.skokovy)

**30-11/02-12-2007 La 19-a IFK** (Internacia Kultura Festivalo) en Ústí nad

Labem. Inf.: [m.smycka@seznam.cz](mailto:m.smycka@seznam.cz)

**15-12-2007 ANKRO**, Antaŭkristnaska Renkontiĝo en Písek. Tradicia Zamenhofa kaj Kristnaska rita programo kun tombolo. Inf.: [esperanto.pisek@seznam.cz](mailto:esperanto.pisek@seznam.cz)

## Kaj jam notu por la jaro 2008:

**2008-02-16/25: Flugkaravano al Barato** (Hindio) kaj Nepalo lige al la 5-a

Asia Kongreso de Esperanto. Inf.: [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

**2008-04-04/06: Sabla Printempo en Písek**, turisma, kultura kaj faka programo (daŭrigo de la seminario "Esperanto en la reto". Inf.: [esperanto.pisek@seznam.cz](mailto:esperanto.pisek@seznam.cz)

**2008-06-29/07-12, -07-13/26, -07-27/08-09.**

**Somera Esperanto-Tendaro en Lančov**, la Esperanto-aranĝo kun la plej longa tradicio en Ĉeĥio, jam kvinan fojon en la sama loko! Ĉiutaga antaŭtagmeza laŭelekta instruado de lingvo (ĉiam ankaŭ Esperanto elekteblas). Inf.: [podhradaska@volny.cz](mailto:podhradaska@volny.cz)

**2008-07-18/27: Aŭtobusa karavano al la 93-a Universala kongreso de Esperanto en Roterdamo.** Inf.: [mirka.tomeckova@seznam.cz](mailto:mirka.tomeckova@seznam.cz)  
**Somero: EKOTUR 08**, Tradicia ekoturisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj.

Unusemajna, proksime de Prago, probable en la dua duono de aŭgusto en Karlštejn, dato kaj loko precizigota. Inf.: [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

**2008-11-07/09: KAEST 2008** (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en Dobřichovice. Inf.: [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

## La sankta monto Fuji el flugmaŝino



fotis Frank Nietzsche

## Ni kondolencas

- la 25-an de majo 2007 forpasis **Václav Šavel** el Praha en aĝo de preskaŭ 98 jarojn, nia plej maljuna membro

- fine de junio mortis **Marie Kuřeová** el Liberec en la aĝo de 66 jaroj

- la 12-an de aŭgusto forpasis **Marvin Stanley** (54-jara), kontisto de UEA.

- la 25-an de aŭgusto forpasis en Sao Paulo elstara brazila esperantistino **Elvira Fontes**, aŭtorino de du furoraj lernolibroj.

- la 26-an de aŭgusto mortis argentina esperantisto **d-ro Enriko Balech** (95-jara), sciencisto pri oceanografio kaj hidrobiologio.

## Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte **tiskopis VKLAD**, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu**: 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete V. Hiršovi seznam, za koho platíte. **Konstantní symbol** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřížek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku.

Seznam čísel (variabilní symboly):

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 50200** sekce železničářů IFEF
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,  
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,  
vlastní b. ú. 86-7290070227/0100
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio

### Upozornění

#### pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

## Zájemci o časopisy

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, [cea.polnický@quick.cz](mailto:cea.polnický@quick.cz). Předplatné uhradíte na účet u České spořitelny v Poděbradech, č. ú. 0017 011 013/0800, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato**: 890,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4

**La Gazeto**: 650,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

**La Ondo de Esperanto**: 540,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4

**Juna Amiko**: 300,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formátu A5

**\*Literatura Foiro**: 1000,- Kč, v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5

**\*Heroldo de Esperanto**: 1080,- Kč, v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A3

**\*Femina**: 660,- Kč, v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

**Litova Stelo**: 300,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

**Pola esperantisto**: 360,- Kč, v.s. 07009, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

\*předplatitelé označených časopisů z ČR získají slevu 50%, pokud si zažádají o esperantské občanství - Esp. civito (t.zn. že za uvedenou částku mají časopis předplacen na dva roky)

**Periodikum Českého esperantského svazu - 38. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**malovec@volny.cz;**

**<http://members.chello.cz/malovec/>**

**Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov  
117, 683 04 Drnovice, 517 385 367,  
hirs@gm.vyskov.cz**

**Uzávěrka příštího čísla: 15.11.2007**

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -  
- 38-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj  
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, e-mail: malovec@volny.cz;**

**<http://members.chello.cz/malovec/>**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero:  
15.11.2007**

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**



Esperanto en Okříšky - d-ino Bártlová kun siaj kursanoj en la lernejo kaj rakontado en la loka biblioteko, kie 250 gelernantoj aŭdis unuafoje pri la internacia lingvo